# VERDA VOĈO

Printempo 1955. SOMERA KOLEGIO DE ESPERANTO EN D O K S Y .

## NI ESTU ESPERANTISTOJ !

Esperanto estas lingvo. Per lingvo oni esprimas siajn pensojn kaj ideojn. Ju pli perfekta estas la lingvo des pli facile oni povas stimuli la ideojn. Esperanto, dank' al genieco de Zamenhof, estas lingvo esprimriĉa, facile lernebla kaj internacia. Ĝi dependas de neniu unuopa nacio, sed de la tuta homaro. Nin Esperantistojn neniu devas instigi al paco; ĝuste pro tiu ĉi ideo ni fariĝis Esperantistoj. Kaj kiu atakas nin, mem rompas la pacon. Ne estas neceso laŭte paroli, sed kviete labori kaj servi al tiu nobla celo, kiel ni faras...

Per lingvo oni esprimas siajn pensojn kaj ideojn, mi diris de komenco. Sed tiun lingvon oni devas regi por esti kapabla esprimi sin ne nur skribe, sed ankaŭ parole. Post la venko ĉe Unesko ni havas pli respondan devon. Ni devas montri, ke Esperanto estas vere lingvo parolata, ke oni fine ĉesu nin rigardi kiel balbutantojn, strangulojn. Estas vere dolore, se oni renkontas malnovan samideanon en klubo kaj li ĉe esperanta alparolo diras:"Pardonu, mi komprenas, sed paroli mi ne kapablas". Estus vere interese scii, kiom da esperantistoj flue parolas Esperanton!

A.S.

\- - -

Karolo Píč : P R I N T E M P O .

Estas printempo,
Estas ĵaŭd' .
Ekstere pluvas:
Plaŭd! Plaŭd! Plaŭd!

Pluvo fenestrojn
skurĝe lavas.
"Ĉu", ŝi demandas,
"li min amas?"

Estas printempo.
Sur tegment'
kuras petola
varma vent' .

Kaj vent' responde
sen ekĉes
muĝe rediras:
"Jes! Ne! Jes!"

Estas printempo.
Estas ĵaŭd' .
Ekstere pluvas:
Plaŭd! Plaŭd! Plaŭd!

\- - -

Estas printempo kaj baldaŭ venos somero. Baldaŭ venos por ĉiu libertempo. Ĉu vi dezirus travivi parton de via libertempo en Somera kolegio de Esperanto en Doksy, kies kursoj estas tiel ŝatataj kaj alte taksataj. Ĉu vi volas fariĝi parolantaj Esperantistoj ? Ĉu vi volas travivi neforgeseblajn du semajnojn en verda familia rondo? Se jes, do skribu afable dezirante informojn al Somera kolegio de Esperanto, s-ano Václav Šmůr en Doksy u Máchova jezera.

\- - - - -